

Arthur kaj Heidi Baur kun Claude kaj Andrée Gacond:
Konversacio de la esperanto-parolistoj de SRI (3. Heidi Baur-Claude Gacond)
SRI-123-1-773-1984

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-123/SRI-123-1-773-1984-Arthur-Heidi-Baur-Claude-Andree-Gacond-Konversacio-de-la-esperanto-parolistoj-de-SRI-3.mp3>

AB.- Karaj geaŭskultantoj. Tiuj, kiuj aŭskultis nin lastajn semajnojn jam scias, ke ni faras nun intervjuon inter ni kvar radiolaborantoj esperantaj en Svisa Radio Internacia. Ni daŭrigas hodiaŭ kun intervjuo, kiun faras s-ino Heidi Baur al Claude Gacond.

HB.- Sinjoro Gacond, ĉu vi povas rapide prezenti vin?

CG.- Jes, se vi volas. Mi naskiĝis kaj studis en la urbo Neuchâtel, tute proksima de la urbo La Chaux-de-Fonds, kie nun mi laboras, kaj estas en ties porinstruista lernejo ke mi konatiĝis kun mia estonta edzino. Mi fakte studis unu jaron en la universitato etnologion. Kaj unu nokton mi subite ŝvite rimarkis ke mi neniam trovos laborpostenon, ĉar estas ĉiuj, ni diru muzeoj etnologiaj estis okupitaj de junaj etnologoj kaj dum 20 aŭ 30 jaroj neniun posteno liberigis. Do, mi decidis tiun nokton komplete ŝanĝi mian direkton, mi fariĝis instruisto kaj mi dediĉis multe de mia tempo al la Servo Civila Internacia.

HB.- Ĉu vi memoras sinjoro Gacond, kie kaj kiam ni renkontiĝis la unuan fojon? Ĉu estis tiam, kiam vi alportis tiun amason da libroj al Winterthur kaj poste serĉis ilin denove? Mi memoras ke mi kredas tiam la unuan fojon mi vidis vin.

CG.- Jes, estis jam multe pli poste, kiam mi jam zorgis pri tiuj ĉi centroj, kiujn mi kreis ĝis iomete tiuj medioj. Oni komencis paroli pri interlingvistiko. Iom post iom, do la Centro de Dokumentado kaj Studo pri la Lingvo Internacia en Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Kaj ni savis la dokumentojn pri Okcidenta, kio estis minacita je pereco.

AB.- Ĉu tio koncernas la Bibliotekon de La Chaux-de-Fonds, kio enhavas ĉion, kio okupiĝas pri mondlingvoj ĉiuspecaj?

CG.- Jes, fakte mi faris - oni povus diri - 'ekumenan' laboron rilate al interlingvistiko.

AB.- Bona vorto.

CG.- Ĝis mia alveno la adeptoj de la diversaj planlingvoj kverelis, minacis sin, ne plu volis sin vidi kaj mia interveno estis savi tiun komunan heredaĵon. Kaj fakte reamikiĝis iomete tiuj medioj, oni komencis paroli pri interlingvistiko. La esperantistoj iom timis min, eĉ malŝatis min, ĝis kiam ili rimarkis ke estis inda laboro kiu nun kondukis al verŝajne unu el la kvar plej grandaj dokumentejoj pri Esperanto kaj interlingvistiko en la mondo.

AB.- Pardonu ke mi interrompis, s-ino Heidi Baur nun daŭrigu.

HB.- Jes, ĉar ni ankoraŭ ne scias, kiam vi konatiĝis kun Esperanto.

CG.- Do, kiel mi diris, mi laboris por la Servo Civila Internacia kaj interalie en tiu medio mi renkontis Edmondon Privat tre ofte, kiu parolis al mi pri Esperanto. Sed, dum mia juneco, post la deviga lernado mi iris unu jaron lerni la germanan lingvon en Goldern, en la *Ecole*

d'humanité de Paulus Geheeb, antaŭe estis la Odenwaldschule en Germanio, kaj tie Gerard Cool, profesoro pri matematiko estis esperantisto kaj ankaŭ iom infektis min tiurilate, mi ne lernis tiam. Sed mi legis multe la gazetojn *L'Essor* kaj *Coopération*, kie Edmond Privat ofte parolis pri Esperanto. Kaj en la porinstruista lernejo unu profesoro, profesoro pri historio en la Universitato de Neuchâtel, Louis Roulet diris monstraĵon pri Esperanto. Li ripetis sloganon, ke estas artefarita lingvo, ono povas en ĝi ĉion esprimi sed nenion pensi, aŭ io simile. Bone kaj tio vipis mian intereson, mi iris al civilisto, Jules Gilliard, kiu estis ankaŭ, se mi ne eraras, prezidanto de Svisa Esperanto-Societo. Li donis al mi romanon, 'La longa vojo', kaj pere de tiu romano, kiun mi legis en unu semajnfino, mi lernis la lingvon. Kaj tiam komenciĝis miaj aventuroj.

HB.- Ĉu vi povus diri la jaron, en kiu vi fariĝis aktivulo en la movado, proksimume.

CG.- Do, mi eklernis en 1952, do en 1953 mi fariĝis aktivulo - ne vole. Mi iris al la kunveno de Svisa Esperanto-Societo, kie mi ne havis tre bonan impreson, estis ĉefe olduloj laŭ mi kaj la temoj de la diskutoj estis statutŝanĝoj kaj kotizoj kaj serĉado de prezidanto. Sed la parolado de Edmond Privat impresis min. Kaj subite, dum unu el tiuj diskutoj, kiujn mi ne komprenis, oni sin turnis al mi, demandis ion. Mi ne volis montri ke mi ne bone komprenis, mi diris 'jes' kaj oni aplaŭdis. Kelkajn tagojn poste mi ricevis grandan skatolon kun leterpapero, stampilo kaj mi tuj telefonis al Bruno Graf, kiu tiam zorgis, mi kredas, pri la junularo...

AB.- Li estis prezidanto...

CG.- ... de la junularo, tiam. Kaj li diris: «jes, jes, ni bone vidis ke vi ne komprenis, sed pro tio ni ne faris demandon. Ni elektis vin sekretario de la junularo por la franca parto de la lando». Do, kion fari, mi bone, honorige plenumis mian postenon. Mi komencis organizi la famajn monatajn semajnfinojn kaj la skiferiojn kun mia estonta edzino. Mi lertiĝis en la lingvo, por povi fari la protokolojn mi devis iom lerni ĝin. Kaj poste ĉio kreskis, mi kreis la esperanto-edukistaron, kiu transformiĝis iom post iom al Kultura Centro Esperantista.

HB.- Do la vera scenejo de via nuna vivo estas La Chaux-de-Fonds kaj la Kultura Centro Esperantista. Mi ankoraŭ, bedaŭrinde mi ankoraŭ neniam estis tie, sed mi estas tre scivolema pri tio, kion vi tie faras. Ekzemple pri tiuj domoj, kiujn vi aĉetas kaj...

CG.- ...aĉetadas, jes, ... Ni estas kiel boao, vidu: ni glutas domojn kaj poste ni paraliziĝas en nia laboro, ĉar ni devas transformi ilin. Do, digesti, ni digestas ilin. Do estas tiel. Fakte, la tuta aktiveco estas tre influita de Edmond Privat. Je la fino de sia vivo en 1962 li analizis kun ni, kion li sukcesis kaj kion li ne sukcesis. Ekzemple li diris: «mi sukcesis kun Svisa Radio Internacia, la Esperanto-fako, ĉar ĝi estis protektita kontraŭ la esperantistoj. Ili ne povas interveni. Kaj ni ne sukcesis, kiam iu ajn esperantisto povas fari iun ajn proponon». Kaj li diris, nun vi devas krei centron, kiu povos krei iom post iom - ni diru - altlernejon. Sed, ĝi ne povas ekzisti, se ne paralele ekzistas dokumentejo. Ĉar oni ne povas studi sen aliri la dokumentojn. Kaj li inspiris la statuton de tiu Kultura Centro Esperantista, kies celo estis akiri domojn, akiri almenaŭ unu domon, ni diru. Sed la hazardo faris ke en la urbo La Chaux-de-Fonds estis sep samaj laboristaj domoj en vastaj ĝardenoj...

AB.- ...en la regiono ?

CG.- ...jes, kaj borde de la urbo en tre kvieta loko. Kaj ke ni povis ilin akiri. Oni donis al ni dek jarojn, sed kiel akiri, kiel trovi la monon? Do, ni fondis bankon. En Svislando estas sufiĉe facile krei bankon, bankon kun ŝparlibroj. Kaj ni alvokis. Kaj la rezulto estis ke alfluis po 100, preskaŭ po 200 mil frankoj jare kaj ke ni povis akiri en 1978 du unuajn domojn. La du postajn jarojn ni povis komplete modernigi ilin kaj rapidiĝis la afero. En la jaro 1982 ni akiris la trian, kaj subite, pasintjare ni akiris la kvar lastajn kaj ni devis ankaŭ transformi ilin. Kaj nun ni estas eble la plej granda tia centro esperanta en la mondo.

HB.- Sed tiuj donantoj ne estas esperantistoj, ĉar kutime esperantistoj ja ne havas monon.

CG.- Vidu, ili ne havas monon por donaci, sed ili ne donacas, ili ŝparas. Ili malfermas ŝparkonton kaj ili ricevas interezadon kaj la plimulto estas esperantistoj de Svislando.

AB.- Bone ! Vi aŭdis la trian el la intervjuoj de la radio-laborantoj de Svisa Radio Internacia. Proksiman fojon vi aŭdos la kvaran kaj lastan. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), novembro 2013*